Gerrit Isai Berveling

# Religiaj movadoj
# Persekutoj

## Gravaj ĉapitroj el la Kultura Historio[1]

[1] La teksto origine aperis sub la titolo *gravaj ĉapitroj el la kultura historio: religioj / persekutado religia* kiel ĉapitro de la *Antologio Latina*.

# *Religiaj movadoj*

Por multaj nuntempaj homoj, certe por tiuj el la ne-Eŭropaj kulturoj, sed ankaŭ por multe da Eŭropanoj (kaj Nord-Amerikanoj) kiuj ne plu estas kristane edukitaj, povas iom fremdige efiki, se en nia *Antologio Latina* ĉi tie ni enŝovas sufiĉe detalan ĉapitron pri teologiaj demandoj. Se tio okazos en volumoj, kiuj traktas la Mezepokon, tion oni certe pardonos al ni, sed ĉi tie … nu, oni eble iom hezitos.

Por klarigi, mi povas substreki, ke en la nun traktata periodo certasence *formiĝis* la kristana tradicio. Ĝis tiam ĝi ankoraŭ estis sufiĉe senkohera kaj varia[2], sed en tiuj ĉi jarcentoj unueciĝis kaj la eklezia strukturo kaj la doktrina ortodokseco. Kaj kiel sciate, ĝuste la kombino de la Greka-Romia heredaĵo kaj la Juda-kristana tradicio kune formas la bazon de nia nuna Eŭropa kulturo.

Tial estas utile iom detale trakti, kiel estiĝis tiu kristana tradicio.

Unue, kristanismo estas religie pluralisma movado, kiu estiĝis kiel reago al la agado de Jesuo de Nazaret kiel Mesio – aŭ Greke: Kristo[3], kaj de ties lernintoj. Tiu movado, en kiu ajn konkreta formo ni renkontas ĝin, sin mem kutime nomas *Eklezio*. Por ni nunuloj estas memkompreneble, ke

---

2 Vidu ekzemple la priskribitan diversecon de la plej fruaj komunumoj kristanaj en *La evangelio laŭ Maria Magdalena*.

3 Kristo / Ĥristo / Χριστός = Sanktoleito, same kiel la Hebrea vorto Maŝiaĥ, Grekigite: Mesio. Arabe: Masiĥ, troveblas en Korano.

ĝin formis la kristana Biblio, kiu – kontraste kun la Juda Biblio[4] – konsistas el du partoj: la Olda Testamento kaj la Nova Testamento[5]. Sed ĉi tie por multaj finiĝas la scio. Tamen, ne estas *aŭtomate* vera, ke la Biblio konsistas el O.T. plus N.T., ĉar ja ekzistis sufiĉe fortaj tendencoj interne de la frua kristanismo, kiuj strebis elimini la Oldan Testamenton. La fruaj kristanoj parte estis ankoraŭ de Juda deveno, sed tre baldaŭ – kaj decidige! – superregis la novkonvertitoj el la ceteraj popoloj (la gojoj). Kaj legante la Biblion, tiuj ĉi laste menciitoj ofte havis kiel grandan problemon, ke unuavide en la Olda Testamento renkontiĝas iu Dio, kiu estas sufiĉe naciisma, kiu ordonas mortigi la malamikojn de la Hebreoj, eĉ ekstermi tutajn urbojn da ili, dum en la Nova Testamento, en la Patro de Jesuo ili precipe vidis Dion plenan je amo kaj kompatemo. Do, laŭ pluraj, tio devas esti du malsamaj Dioj. Kaj ĉar la Dion de Jesuo oni intencis sekvi, la alian oni ne povas akcepti samtempe.

Precipe kristanaj gnostikuloj (Gnostiko venas de la vorto *gnosis*[6]) estis tre radikalaj tiuteme.

---

4 TeNaĤ: Torao, Profetoj kaj ceteraj Skriboj.
L. L. Zamenhof kiel Judo – Hebreo, kiel li mem nomis sin – tradukis kompreneble nur tiun Hebrean tekstaron. Li efektive deziregis, ke aperu memstara eldono precipe por la utilo de liaj samgentanoj. Ĝi bedaŭrinde ankoraŭ ne aperis.

5 En pluraj volumoj aperis mia nova traduko pri NT kun iom da komentoj: *leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo*; *La Bona Mesaĝo de Jesuo* en kvar volumetoj *Laŭ Marko / laŭ Mateo / laŭ Luko / laŭ Johano*; *Flanke je Jesuo*. Ankaŭ la ne-Hebrean parton de *Malnova Testamento* (alivorte *Duakanonaj Libroj* aŭ – protestantece – *Apokrifoj*) mi tradukis el la originalo: *La Duakanonaj Libroj* 1 + 2 + 3.

6 La Greka vorto por *scio*, de kiu devenas la vorto *gnostiko* por la tuta pens-movado.

**Marciono** fariĝis la plej fama inter ili. Li devenis el Ponto (ĉe la Nigra Maro) kaj depost la jaro 144 kontraŭbatalis la katolikan[7] formon de kristanismo. Laŭ li ĝi estis «Jude infektita», kompare kun la origina movado de Jesuo. La antagonismon inter *Torao* kaj *Evangelio*, kiun kelkfoje eblas konstati ĉe Paŭlo, li kulminigis, kaj la Toraon – fakte la tutan Oldan Testamenton – li komplete malakceptis, ĉar ĝi estis liajuĝe la libro de la «kontraŭ-Dio» kiu kreis ĉi tiun mondon. Laŭ Marciono, Jesuo per kompleta pardono de ĉiuj pekoj estis turninta sin kontraŭ la Dio de l' Olda Testamento, kaj sekve ankaŭ kontraŭ ĉi tiu mankohave kreita mondo nia. Tial li metis grandan emfazon sur askezo. El la Nova Testamento nur la leterojn de Paŭlo li akceptis kaj la evangelion laŭ

[7] *Katolika* estas Greka vorto, kiu signifas *ĝenerala*. Nuntempe en la ĝenerala parolkutimo oni ofte limigas ĝian signifon al unu eklezio, nome tiu de Romo, la Romkatolika Eklezio. Sed fakte ekzistas ankoraŭ pluraj specoj de t. n. katolikaj eklezioj. Mi menciu pri ekzemple la Prakatolika, la Grek-katolika (ne konfuzu tion kun la Grek-Ortodoksia Eklezio, kiu estas memstara disde Romo), la Episkopa Katolika, la Libera Katolika k. a. eklezioj.

Luko[8], kiun li konsideris disĉiplo – lerninto – de Paŭlo. Marciono per sia kritiko fakte «inventis» la unuan kanonon de l' Nova Testamento.

La eklezio, kiun fondis Marciono, rapide kvazaŭ konkurenculo disvastiĝis apud la «katolika» movado kaj pluekzistis ĝis en la 4a jc. Multaj ĝiaj anoj mortis martire. Fine ĝiaj restaĵoj kunkreskis kun la Maniĥeoj.

**Montanismo** estas kristana movado, kiu estiĝis en la 2a jc., dank' al la predikado de Montano kaj la profetinoj Priska kaj Maksimila, unue en Frigio (nuna Turkio) sed baldaŭ tra tuta la Romia Imperio. Karakteriza por la movado estis granda religia entuziasmo kaj apokalipsa atendado

[8] Kvankam, se diri pli detale, elinter la konataj leteroj de Paŭlo li jam distingis inter aŭtentaj kaj ne-aŭtentaj eroj, kiujn lastajn li do malakceptis en sia kanono. El la evangelio laŭ Luko li ankaŭ eliminis plurajn partojn, kiuj por li estis tro Judecaj, ekzemple la naskiĝo-rakontojn pri Jesuo. En la moderna teologio depost la 18a jc. multaj liaj temoj revenis.
Por iom resumi, Marciono asertas: 1] la Leĝo Mosea estas sub la homa digno kaj sub la digno de Dio, kiu estas saĝa kaj gracoplena; 2] la Dion, kiu sendis la Mosean Leĝon, ni devas do absolute rifuzi, ĉar obsedas Lin nur justeco (punpagigo kontraste al graco) kaj kiel tia Li malamikas al la homa gento kaj montras sin kreanto de la malbona materia mondo; 3] subite aperis, kiel io plene nova, Jesuo: tiu malkaŝis novan ĝis tiam nekonatan Dion: la amplenan Patron, kiu kreas spacon, kie la homoj estas liberigataj, kaj elsub la Mosea Leĝo, kaj de la Dio kiu kreis la malbonan mondon; 4] sekve, O.T. kiu atestas pri tiu Dio de l' malbonmonda kreo kaj kiu donis la Mosean Leĝon al Izrael, ne plu validas post Jesuo Kristo; 5] nur kelkaj leteroj de Paŭlo (ĉefe tiu al la Galatoj) kaj reviziita formo de la evangelio laŭ Luko estas akceptindaj por kristanoj.
Por defendi la fakton, ke O.T. kaj N.T. apartenas kune, Tertuliano en sia *Kontraŭ Marciono* montras sin ofte ekstreme kontraŭ-Juda: ke Dio en O.T. punas ĝis tria kaj kvara generacioj, tion Li faras pro la obstino de l' Juda popolo, en la espero ke almenaŭ kelkaj iliaj idoj saviĝos finfine. La Mosea Leĝo ne estas pruvo de ia dureco de Dio, kiel asertas Marciono, sed nemiskomprenebla signo de Lia sublima amo por venki ilian obstinecon. La Mosean Leĝon oni kompreneble ne plu obeu, sed ne pro ia senvaloreco flanke de ties Dia koninto, sed ĝi estas, kia ĝi estas, nur pro la popolo al kiu ĝi estis destinita. Por Tertuliano, O.T. estas kvazaŭ skandal-plena kroniko pri tio, kiel la Juda popolo daŭre kaj ripete estis malobea al Dio. Kaj por li tio kulminas en N.T. en la mortigo de l' al ili sendita Mesio Jesuo.

de baldaŭa mondo-fino. Ili ofte parolis glosolalie[9] kaj vivis askete. Interne de la movado oni baldaŭ konsideris Montanon kiel la de Jesuo promesitan *Parakleton* (Joh. 14:16)[10].

Tertuliano estas la plej konata persono, kiu en certa periodo de sia vivo apartenis al la movado[11].

**Valentino** (naskita ĉ. 100 en Egiptio) laboris meze de la 2a jc. (ĉ. 135 – 160/65) en Romo. Laŭdire tiu ĉi fama gnostika gvidanto unue esperis fariĝi la nova tiea episkopo (papo), sed kiam post la elekto de Pio la 1a tio montriĝis neebla, li multe pli detaligis siajn kosmologie-mistikajn instruojn pri gnostiko. Lia movado nomiĝas la Valentinanoj.

Multaj fakuloj estas konvinkitaj, ke la *Evangelio de la Vero*, kiun en 1945 oni retrovis en traduko inter la Kopta biblioteko[12] de Nag Hammadi, Egiptio, estas lia verko. Ĝis tiam pri ĉi tiu gnostika branĉo oni nur sciis, kion skribas kontraŭuloj.

## Gnostiko

Plurfoje ni jam uzis la vorton *Gnostiko*. Eble ni iom traktu ĝin: Gnostiko estas religie orientita pensmaniero, kiu ekde la 2a jc. p. Kr. disvastiĝis en kaj ankaŭ ekster la Romia Imperio. Iel eblas rigardi ĝin unu el la rezultoj de l' kultura renkontiĝo Helenisma, en kiu kontaktiĝis la Greka (= Helena) kulturo kaj la Mezorienta mondo. Se rigardi la Grekan

---

9 En specialaj revelaciitaj esprimoj kaj lingvoj.

10 Tio signifas, ke laŭ la anoj de l' Montanismo ĉe Montano komenciĝis nova stadio en la Savhistorio de la mondo. Simila identigo kiel la *Parakleto* denove pli poste okazis ankaŭ al la profetoj Mani (de l' Maniĥeoj) kaj Muhammad (de Islamo).

11 Tertuliano dekomence estis akra kontraŭulo de la movado. Ĉar la etikajn postulojn de la oficiala kristanismo li opiniis ofte tro malstriktaj, li fine fariĝis membro de l' asketa Montanismo.

12 La plej fama teksto el ĉi biblioteko estas *La evangelio Kopta laŭ Tomaso*.

flankon, certe gravas la filozofio, precipe Platonismo, kaj Orfeismo (malnova sufiĉe mistike orientita religio, kies heroo estis Orfeo). Ankaŭ troviĝas gravaj radikoj de gnostiko en la praa Persio.

Ekzistis pluraj gnostikaj sektoj, kelkaj relative proksimaj je kristanismo, kiujn la eklezio kontraŭbatalis kiel herezaĵojn; aliaj tendencoj ne havis kristanan flankon. Hermetismo, ekzemple, estas speco de gnostiko kiu rilatas al la religio de l' malnova Egiptio, precipe kun ĝia Dio Thot, Greklingve Hermeso. Unu el la plej influaj kristanaj gnostikaj skoloj estis tiu de Valentino.

Laŭ gnostiko, la homo povas atingi saviĝon pere de *gnosis*, ezotera scio. Tiu scio koncernas la mondon de l' O Dia kaj de la superteraj estaĵoj, sed ĝi ankaŭ liveras komprenon pri la homa ekzisto ĉi-tera, pli rekte pri la homa esenco. Estas dualismo de *spirito* kaj *materio*. La materio estas malpli valora kaj efektive devenas de l' O Malbona. La homo, tamen, dank' al Dia sparko en la interno, estas parenca je Dio, kiun gnostikuloj kutime nomas la Patro. Scio pri Dio tial certasence identas je scio pri sia plej intima memo. La gnostiko estas tre negativa koncerne la konkretan materian mondon: ĉion palpeblan kreis la malbonaj fortoj. La spirito devas liberigi sin el sia ligiteco al la korpo, al la materio. Se iu homo atingas la *scion*, tio estas la spirita resurekto de tiu homo. Kristo estas la instruanto de tiu scio.

Laŭ kelkaj, la homoj dividiĝas en tri grupojn: tiuj homoj, kiuj havas en si la Dian sparkon, kaj kiuj sekve kapablas saviĝi, se *scion* ili atingas. Due la *hylici*[13], t. e. la nur-materiaj homoj, al kiuj mankas la spirita bazo por esti savitaj. Ili, se diri simplige, ja ne posedas animon, estas nur eksteraĵo. Kaj trie la t. n. *psychici*[14], kiuj ja ne atingos la veran *scion*, sed kiuj tamen – farante bonajn agojn – povos atingi certan feliĉecon. Koncerne la ekeston de spiritaj potencoj, anĝeloj, homoj ktp, la gnostiko ne deiras de iu origina kreado fare de Dio, sed de emaniĝo el Dio. Spiritaj estaĵoj estas emaniĝoj el la Patro. La palpebla materia mondo estas kreita ne de la plej

---

[13] De la Greka *hylê* = materio.

[14] De la Greka *psychê* = animo.

alta Dio mem, kiun oni ja ne rajtas respondecigi pri tiu ĉi neperfekta universo nia, sed de iu malpli supera «Dio», la Demiurgo[15].

La spiritaj estaĵoj, la anĝeloj kaj la «Diaj sparkoj» interne de l' homoj (= la animoj) devos liberiĝi el ĉiu ligiteco al la neperfekta, por finfine returniĝi al Dio mem, por ke «Dio estu ĉio en ĉiuj».

La gnostiko tre ofte parolas pri la plej supera Dio kiel «la nekonata Dio», kiu transcendas ĉiun nian komprenon.

La karakterizaĵoj de tiu Dio ofte estas personigitaj en t. n. hipostazoj, la Dia Pensado, la Providenco, ktp. Al tiu «Dia *pleroma* (kompleteco)» apartenas fakte ankaŭ la Eklezio kaj la Homo. Ĉar laŭ Dia kerno ankaŭ ĉiu homo iel apartenas en Dio.

Kelkaj gnostikaj skoloj havis komplikajn instruojn pri multaj tavoloj da anĝeloj kaj demonoj. Aliaj laboris ankaŭ kun kaŝitaj nomoj aŭ sorĉ-formuloj.

Ĝis en la mezo de l' 20a jc. p. Kr. nia scio pri gnostiko grandparte dependis de la literaturo de kristanaj teologoj, kiuj atakis kaj kondamnis tiun movadon. Ilia prezentado, bedaŭrinde, ne ĉiam estis tre objektiva, kvankam la trovaĵoj de 1945 en Nag Hammadi (Egiptio), kie kompletan gnostikan bibliotekon oni elfosis, pruvis, ke iliaj citaĵoj el gnostikaj tekstoj kutime estis sufiĉe fidindaj.

En la 20a jc., kiel iaspeca reago, estiĝis eĉ novspeca gnostiko: ie tie fondiĝis gnostikaj eklezioj eĉ kun episkopoj. Tiu ĉi speco de gnostiko ne transprenis la ege negativan sintenon de la frua gnostiko rilate al la homa korpo.

---

15 Laŭlitere: la Manlaboristo, konstruanto.

## Maniĥeismo[16]

Maniĥeismo ne estas nur kristana movado, sed havas tamen multajn rilatojn kun kristanaj movadoj. Ĝi estas religio, fondita de la profeto Mani (ĉ. 215-275), kiu devenis el Juda-kristana baptista sekto en Persio. Surbaze de siaj vizioj li predikis religion de interkomprenIĝo kaj toleremo, kiun kutime oni nomas sinkretisma. En siaj leteroj li ĉiam nomas sin «apostolo de Kristo». Post vojaĝoj al Hindio kaj – laŭdire – eĉ ĝis en Ĉinio, li revenis al la kortego de la Persa reĝo. Li mortis krucumite sub nova reĝo, viktimo de l' malamo de la pastroj de Zaratuŝtro. Postrestas de li pluraj sanktaj skriboj.

Aŭgustino dum siaj junaj jaroj relative longe estis aktiva «aŭskultanto» (unuagrada inicito) en tiu religia movado. En la 20a jc. dank' al trovaĵoj en Turfan (Turkestan, Ĉinio), Medinet Madi (Egiptio) k. a., oni malkovris multajn originalajn tekstojn de Maniĥeismo, kiun ĝis tiam oni nur svage konis dank' al citoj ĉe ĝiaj kontraŭuloj.

Maniĥeismo multrilate similas je gnostiko. Tamen ĝi havas specifajn trajtojn, kiuj faras ĝin pli universala religio. La «mitologio» de l' Maniĥeismo rakontas pri emaniĝoj el la plej supera Dio. Krome ekzistas iu eterna Kontraŭ-Dio, la Mastro de l' Mallumo. Tiu forto de l' mallumo atakis kaj parte forkaperis spiritajn estaĵojn el la regno de l' lumo. Per tio, komence de l' historio de la universo, komenciĝis longa batalado. La supera Dio (estro de la lumo) sendis la prahomon, kaj sendis la vivantan Spiriton por subteni lin. Celo estis konsciigi ĉiujn lum-elementojn kaptitajn en la – malbona – materia mondo (la animojn) kaj savi ilin retro al la regno de l' lumo. Jesuo estis sendita de Dio por diskonigi tiun *scion*. Pluraj animoj, kiuj iel jam estis savitaj, tamen pro amo al la cetera mondo rifuzas jam enlumiĝi, sed unue volas ankoraŭ labori en nia mondo por

[16] La vorto venas de *maniĥaj* = *Mani vivas*! Tio estas kredkonfeso: Mani mortis martire – sed li ja *vivas*! Ankaŭ la Maniĥea etimologio, kiun donas Aŭgustino, estas sciinda: *μάννα χεῖ* = li elverŝas manaon; en sia (sola konata, do kontraŭ-Maniĥea) tempo Aŭgustino mem derivas la nomon de *μανία* = frenezo.

savi pli da animoj el la mallumo[17]. Mani estis la lasta en la serio da profetoj, senditaj de Dio por helpi al la homaro retrovi sian originan destinon: Zaratuŝtro, Budho, Jesuo … Li estas la *Parakleto*. La Maniĥeaj komunumoj konsistis el du gradoj: la aŭskultantoj kaj la elektitoj. La dua grado estis pli intime inicita en la misteroj de l' *scio* kaj vivis askete, sen seksaj rilatoj, vegetare kaj senalkohole. La aŭskultantoj estis devigitaj obei certajn moralajn regulojn kaj subteni la elektitojn. Ĉefo de la komunumo (eklezio) estis iaspeca papo aŭ imamo, unue en Babilono, poste en Samarkand. Loke – regione – ili konis episkopojn kaj presbiterojn. La diservo grandparte konsistis en preĝado kaj fastado; ĝi ne konis statuojn aŭ oferojn de bestoj, ĉar mortigo estis severe malpermesita.

Maniĥeismo rapide disvastiĝis orienten ĝis en Ĉinio (kie oni retrovis en la 20a jc. plurajn sanktajn tekstojn) kaj okcidente ĝis en Sud-Francio kaj Hispanio; ĝia influo je Kristanismo kaj Islamo estis grandega.

---

[17] Komparu kun la koncepto de Avalokitesvara en Budhismo, kiu ankoraŭ ne akceptas la enlumiĝon (budhiĝon) antaŭ ol ĉiuj homoj surtere estos iluminiĝintaj.

# *Persekutoj*

## a] pri (ortodokse) kristanaj martiroj

La Romia socio kutime ne tiom okupiĝis pri ĉies *persona* konvinkiĝo: ĉu fidi je Dio aŭ Dioj, kio gravas? Gravis nur la *socia* dimensio: se iu estis elektita en loka urbestraro (eĉ en vilaĝo), ĉe la enoficiĝo oni estis devigita fari oferojn al la Dioj, por petis ties benon por la oficperiodo. Se iu havis konsciencriproĉojn, kiel okazis ĉe kristanoj en tiu situacio, li ne povis esti bona civitano. Do kristanoj pli malpli aŭtomate ekagadis kvazaŭ eksteruloj de la socia vivo. – Same kompreneble jam de generacioj estis la situacio koncerne Judojn: pro la *Toraaj* reguloj, la plimulto de la religiaj Judoj ne vidis eblecon manĝi komune kun siaj najbaroj, eĉ ne ĉe simplaj kvartalaj festoj, kiam oni manĝis ekstere sur benkoj.

Do rezultis certa *fremdeco*. Kaj el fremdeco relative facile estiĝas malamikeco, klaĉoj en la najbaraĵo, k. s. – multaj «religiaj persekutadoj» ofte estas, ĉe pli deapuda pristudado, kvartalaj kvereloj inter najbaroj. La lokaj aŭtoritatuloj sentis sin devigitaj por fari kvieton, interveni kaj puni la kulpulojn – kio ofte estas la malplimulto, kiel pli facile kaptebla. Eble al tio atribuendas pluraj persekutoj, kiujn aludas tekstoj en Nova Testamento: Judoj kaj «nov-Judoj» (= kristanoj) interkverelis kaj per tio perturbis la kvieton socian …

Kelkfoje, tamen, okazis certa persekutado instigita de la registaro: ekzemple, unuafoje kiom ni scias en la historio de Romo, tio okazis dum Nerono (54-68). Kiam okaze de la fifama brulo de Romo, kiu kreis spacon por ampleksaj imperiestraj ĝardenoj kaj poste eĉ la Koloseo, la popolo en la brulantaj kvartaloj malriĉulaj ekprotestis, kulpigante pri la brulo la imperiestron (oni eĉ asertis ke laŭ lia ordono soldatoj forpuŝis sitelojn kun akvo el la brakoj de la homoj, kiuj kontraŭbatalis la fajregon), jam baldaŭ la protesto tiom akriĝis, ke Nerono sin sentis minacata. Li kulpigis tiam la *kristanojn*. Supozeble pri kristanismo li sciis nenion aŭ preskaŭ nenion.

Kiel ajn – ĉiu, kiu havis problemon kun iu ajn najbaro povis senprobleme kulpigi tiun pri kristanismo: la policistoj arestis, pridemandis (ne senperforte) por eligi konfesojn, kaj multajn oni kondamnis. Nerono fariĝis fifama kiel la unua persekutanto de Kristanismo[18].

Kio rezultis el tiu incidento? – Leĝo imperiestra de Nerono, ke «ne rajtas esti kristanoj»[19].

Poste estis relative kviete en la vasta Imperio ĝis Domiciano (81-96), kiu postulis esti adorata kiel «Sinjoro kaj Dio». Dum lia regado verkis la profeto Johano sian *Apokalipso:* konata el nia *Nova Testamento*.

En 250 p. Kr. imperiestro Decio entreprenis provon fine komplete ekstermi Kristanismon, devigante oficistojn-policistojn iri laŭ la pordoj de la homoj por peti, ke oni plenumu oferado-ceremonion al la tradiciaj Romiaj Dioj. Kiu tion faris, ricevis ateston; kiu ne, riskis la morton. Dum ĉi persekutado mortis pluraj kristanoj, sed minimume same multaj – eble pli – apostatiĝis, kio post la morto de Decio liveris grandan problemon al teologoj.

---

[18] La priskriboj en *Quo Vadis* de Sienkiewicz pri tutaj preskaŭ senfinaj vicoj da senkulpaj kristanoj murditaj historie estas ne realecaj. Eble tie parte parolis la Pola patrioto. Pli serioze traktas la temon Anna Löwenstein en sia *Morto de Artisto*.

[19] Vidu en *Antologio Latina* 4, ĉe Plinio-Trajano.

Konserviĝis pluraj tiaj atestaĵoj pri oferinteco al la tradiciaj Dioj. Ekzemple en papirusaj fragmentoj el Egiptujo.

En 303 Diokleciano komencis lastan ĝeneralan ekstermo-provon pri Kristanismo. Por postaj generacioj ofte li estas kvazaŭ ekzemplo: Ĥrotsvitha de Gandersheim (ĉ. 935 – ĉ. 1002), monaĥino Germana, verkis plurajn teatraĵojn, i. a. *Dulcicio* pri la persekutado tempe de Diokleciano.

La venko de Konstantino kaj lia edikto pri tolerado el 313 finis la periodon de persekutado. Sed post tiam Kristanismo foje fariĝis de persekutata en persekutantan potencon.

Restas al ni sufiĉe multe da t. n. *Martir-atestaĵoj aŭ Martiraktoj*. Post martiriga proceso la surlokaj kristanoj kolektis la protokolojn, foje iom ornamis aŭ prikomentis tiujn per propraj reagoj k. s., kaj uzadis ilin, ekzemple okaze de diservoj por ĉiujara memorado pri la morto de la koncerna martiro. Ĉar pri martire mortintaj kred-atestantoj[20] oni nepre kredis, ke ili *rekte* iris al Dio en la ĉielo, laŭ la diro de Jesuo al la t. n. «kredanta murdisto», kiu kun li estis krucumita: *Laŭ Luko* 23:43.

En la nuna libro oni povas legi ankaŭ la *Martirakto de Skilio* kaj la plej faman: *Pasiono pri Perpetua kaj Feliĉita*. Ĉi-volume sekvos pliaj por ankaŭ iom montri diversajn tipojn.

## b] pri Donatistaj martiroj

La Donatistoj estas kristana movado, kiu estiĝis ĉirkaŭ episkopo Donato de Kartago (313 – 355), kiu estis elektita episkopo de parto de la loka eklezio anstataŭ alia episkopo, kiu laŭ ili ne estis sufiĉe severa. Efektive do temis pri loka skismo. La jaro 313 (la jaro de la edikto pri tolerado de Konstantino: fino pri persekutadoj kontraŭ kristanismo) por la eklezia historio gravegas. Sed tiu edikto ne finis ĉiujn problemojn: la diskutoj, kion fari pri kristanoj, kiuj cedis antaŭ persekutado kaj portempe malkonfesis sian religion, kiuj jam ege akre dividis la spiritojn tempe de Cipriano, ankaŭ plu disŝiris la komunumojn kristanajn: la sekvantoj de

[20] Efektive *martiro* signifas *atestanto*, nome pri la fido.

Donato postulis, ke «vera» eklezio estu «perfekta», do senmakula. Do homoj, kiuj iam malkonfesis, ne plu povis esti membroj, ktp.

La Donatisma skismo – kiun nuntempe oni probable titolus *fundamentisma* – vaste disŝiris la Afrikan elezion: ili formis propran paralelan eklezion; en 336 Nord-Afriko havis jam 270 Donatismajn episkopojn. En koncilio de *Arles* (Suda-Francio) ili estis kondamnitaj, sed ili plu ekzistis. Imperiestro Konstantino en 321 eĉ oficiale agnoskis ilin kiel duan eklezion en Afriko, kun egalaj rajtoj. Multaj lokoj havis du episkopojn.

Kelkfoje la Donatistoj formis perfortemajn grupojn por ataki «normalajn» (katolikajn) kristanojn, kredante, ke se ili mortos tiumomente, aŭtomate ili fariĝos martiroj – sekve venos en la ĉielon. Kiu aliĝis al ili, estis re-baptita, ĉar la normalan bapton (de «tiu ne sufiĉe radikala kristanismo») ili ne rekonis.

Donatismo daŭris plu kiel propra paralela kristanismo. Ankaŭ tempe de Aŭgustino (fine de la 4a jc.) la situacio restis tragedia. En 411 li organizis religian diskuton kun ili en Kartago: 286 Katolikaj episkopoj kontraŭ 279 Donatismaj[21]. Denove Donatismo estis kondamnita, sed ĝi restis plu ekzisti ĝis ĉe la alveno de Islamo[22] ĝi malaperis.

## c] pri Arianaj martiroj

Arianismo estiĝis pro instruo de Ario (256 – 336), presbitero en Aleksandrio. Li emfazis la unuecon de Dio. Malsame ol la plimulto de Kristanismo, Arianismo konsideras Jesuon kaj sanktan Spiriton kiel submetitajn al Dio la Patro. Fariĝis eklezi-vasta konflikto inter

---

[21] Unu de la temoj estis, ĉu sakramento (bapto, ekzemple) estas valida, se faras ĝin iu pastro ne vere inda. Laŭ Donatistoj ne – laŭ Katolikoj jes, ĉar ne la pastro estas garantio pri sakramento, sed nur Dio mem. Homoj ja povas esti neperfektaj.

[22] Historie la konkero de Nord-Afriko fare de Islamo estis grande faciligita de tio, ke multe da tieaj kristanoj vere laciĝis pri ĉiaj internkristanaj pridogmaj kvereloj. Islamo prezentis simpligitan teologian instruon facile akcepteblan por multaj.

Unitariismo kaj Trinitariismo[23]: kredo je Dio kiel Triunuo. En 325 la – oficiale nur pagana! – imperiestro Konstantino kunvokis la unuan ekumenan koncilion en Niceo; la akceptita kredkonfeso de Niceo parolas pri Dio la Patro kaj la Filo kiel «samsubstancaj». Tamen, Arianismo plu ekzistis, ĉar la filozofiajn terminojn ili malsame interpretis ol la ortodoksaj kristanoj.

En 251, dum imperiestroj Decio kaj Herenio Etrusko, la tiama papo de Romo sendis sep episkopojn al Gaŭlio por tie venki Arianismon. Multaj Gaŭloj ja apartenis al Arianismo. Ankaŭ pluraj Ĝermanoj popoloj rande la Romia Imperio aliĝis al ĝi.

Fama estas ankoraŭ la okcident-gota episkopo Vulfilo (*Wulfila*, ĉ. 310 – ĉ. 382), kiu faris Gotan tradukon de la biblio. Vulfilo disvastigis la Arianan version de kristanismo inter la Gotoj.

Kelkaj imperiestroj malkaŝe subtenis Arianismon, dum aliaj persekutis ĝin. Ĉ. 400 p. Kr. en la Romia Imperio pere de akra persekutado ĝi estis pli malpli neniigita.

## d] pri Judaj martiroj

Ĝenerale koncerne Judojn estis relative kviete en la vasta Imperio. Krom, kompreneble en Palestino mem. Judismo estis ne devigita kunkulti la Imperiestron en ties Dia rolo; la Romia ŝtato «realisme» akceptis ilian «fremdecon» en tio, ke Judoj ja simple ne havas pli ol nur unu Dion – kaj sekve dua Dio ne estas nur eta paŝo kiel ĉe ĉiu «normala» religio … Sekve oni lasis ilin kvietaj en tio. Kondiĉe, ke ĉiujare la Ĉefpastro preĝu en la templo en Jerusalem por la sano de la imperiestro – kaj pagu iom da ekstra tributo…

Ankaŭ tre grava ĉi-teme estis la pogromo en Aleksandrio sub Klaŭdio; la tuto komenciĝis el intenco de Kaligulo en 39 p. Kr. starigi statuon pri si

[23] Dum la *Reformacio* la temo, kompreneble, ree fariĝis aktuala: Michaelo Servet en Genève eĉ martire mortis pro ĝi sur brulŝtiparo – kun plena konsento de Kalvino mem.

mem en ĉiuj temploj, ankaŭ en tiu de Jerusalem[24]. En 49 ĉiuj Judoj estis ekzilitaj el Romo, ĉar ofte okazis kvereloj kaj stratbataloj inter (eks-Judaj) Kristanoj kaj (pli ortodoksaj) Judoj. Klaŭdio forpelis ĉiujn, por gardi kvieton.

En 66 iu Floro (*Florus*) ŝtelis aferojn el la templo en Jerusalem; rezultis insurekcio kontraŭ la Romia potenco, kun kulmine la neniigo de la Juda templo en Jerusalem (70 p. Kr.). Ĉirkaŭ tiu tempo estis neniigitaj i. a. la setlaĵoj en la nuna *Qumran*[25] kie en 1947 – 1956 oni retrovis en 11 grotoj amason da Hebreaj tekstoj kaj fragmentoj, i. a. pli malpli kompletan rulaĵon kun la teksto de *Jesaja*.

Mortis tiumilite amaso da homoj; multe fuĝis.

En 116 Hadriano ordonis mortigi ĉiujn Judojn en Mezopotamio; sekvis la «Dua Juda Insurekcio»; en 117 li i. a. malpermesis la cirkoncidon al Judaj knaboj (kun pravigo, ke li deziris protekti infanojn kontraŭ korpa mutilado); sekvis pli da kontraŭ-Judaj verdiktoj: malpermeso studi la Toraon, malpermeso celebri la ŝabaton. En Lido (nuna Lod) multaj Judoj pereis.

La «Tria Insurekcio» estis 132 – 135, sub gvidado de Simono Bar Koĥba, kiun oni honoris per la titolo *Mesio*. La Romiaj armeoj reagas ege fanatike. Fine mortis inter 600.000 kaj eble miliono da Judoj. Jerusalem estis neniigita kaj samloke oni konstruis Greke-Romian novan urbon kun la nomo Elio-Kapitolino (*Aelia Capitolina*), kun ĉeftemplo dediĉita al Jovo.

Rezultas la *diasporo*.

Persekutado de Judoj fare de kristanoj eble komenciĝis en la 4a jc. Mi ne trovis tekstojn el frua tempo, kiuj tion atestas.

---

[24] Filono Aleksandria (ĉ. 12 a. Kr. – ĉ. 54 p. Kr.) – *Legatio ad Caium*: okazis pogromo kontraŭ Aleksandriaj Judoj; Filono estis membro de delegacio al Romo por protesti ĉe imperiestro Klaŭdio, kiu sekvis Kaligulon kiel imperiestro.

[25] Fakuloj kutime supozas, ke inter ĉ. 140 a. Kr. kaj 68 p. Kr. la setlaĵon okupis branĉo de la t. n. Esenoj, aŭ Kumran-sekto aŭ Mortmara Sekto. Laŭ pluraj estis ia monaĥejo. Aliaj tion neas.

## d] pri Maniĥeaj martiroj

Maniĥeoj en pluraj medioj estis persekutataj. Jam tuj dekomence la profeto Mani mem, kiu mortis martire: origine Mani senprobleme povis predikadi, kun aprobo de la Persa reĝo Ŝapuro la 1a (241 – 272), kiu estis tre tolerema en religiaj aferoj. En la Romia Imperio tamen li estis proverbe fi-fama kiel la plej grava neniiganto-malamiko, iom simile kiel siatempe Hanibalo. Imperiestro Valeriano la 1a (253 – 260) estis venkita de li kaj ĝismorte torturita; lia haŭto – preparita – pendis kiel trofeo en la palaco de Ŝapuro. Sed la kasto de la magoj (pastroj de Mitrao) post lia morto, sub reĝo Baramo la 1a (*Bahram*), radikale ŝanĝis la etoson: Mani estis kaptita, torturita kaj ĉ. 276 mortis kiel martiro. La Zoroastra religio rekonkeris sian regadon super Budhismo, Judismo, Kristanismo ktp … Depost tiam la Persa regno persekutadis la Maniĥeojn.

Ankaŭ en la Romia Imperio ili ofte estis persekutataj. Por doni ekzemplon koncerne Nord-Afrikon, jen cito el koncerna edikto de Diokleciano de 297[26]:

> La imperatoroj Diokleciano kaj Maksimiano Aŭgustoj kaj Konstantino kaj Maksimino plej noblaj Cezaroj, al Juliano prokonsulo de Afriko: <…> 4 <…> Ni aŭdis, ke antaŭnelonge kiel nova kaj neantaŭvidita plago en tiun mondoparton envenis la Maniĥeoj, devene aŭ naskite el la Persa lando, kiu malamikas al ni, kaj ke ili faras multe da malbono <…> kaj ke estas timende ke, kiel ofte okazas en tiaj aferoj, kun la paso de l' tempo, per siaj malindaj moroj kaj la fiaj leĝoj de la Persoj ili infektos ne nur la modestan kaj kvietan Romian popolon, ĉi tiujn plej senkulpajn homojn, sed eĉ tiun ĉi nian universan mondon, kvazaŭ per mortiga serpento-veneno. <…> 6 Ni do ordonas, ke la aŭtoroj kaj gvidantoj kune kun siaj abomenaj skriboj submetiĝu al plej severa puno, tiel ke ili estu bruligitaj en flama fajro; la sekvantojn kaj la konsentantojn oni mortkondamnu, kaj iliajn havaĵojn oni konfisku por nia trezoro. 7 Se eventuale honoruloj aŭ personoj de certa indeco transiris al tiu ĉi misfama sekto aŭ al ĉi doktrino de Persoj, iliajn havaĵojn vi konfisku por nia trezoro, kaj ilin mem vi sendu en la

---

[26] Cod. Gregor. L. xiv. de maleficis et manichaeis; titulus iv.

minejojn de Feneso aŭ Prokoneso[27]. 8 Por ke ĝisradike neniiĝu ĉi tiu infekto el nia plej feliĉa epoko, via pia sindediĉo haste obeu al la la ordonoj kaj reguloj de nia bonvolemo. Donite la 31an de marto en Aleksandrio.

Do fariĝis leĝo, ke iliajn spiritajn gvidantojn (episkopojn) kaj iliajn sanktajn skribojn oni bruligu, la pli simplajn sekvantojn oni «nur» senkapigu – kaj ĉies havaĵojn por la ŝtato oni konfisku.

Precipe en la 4a jc. tiu konfiskada regulo ofte kondukis al gravaj persekutoj, en kiuj volonte partoprenis ĉiuspecaj, eĉ inter si batalantaj kristanaj grupoj: la katolikaj same kiel la Donatistoj.

Ankaŭ Aŭgustino, kiu mem en fruaj jaroj apartenis al la Maniĥeoj, plene aprobis tiun sintenon de la registaro; li eĉ konsideris ĝia tasko, ke ĝi senigu la landon de herezuloj.

Kiel multe da martiroj Maniĥeaj efektive falis, ne estas sciate. Sed ĉu multnombre aŭ ne: tiu ĉi persekutado estis relative efika. Maniĥeismo grandparte malaperis el la Romia Imperio.

---

[27] Kiel punlaboruloj. Feneso estas nekonata. Prokoneso estas insulo en la *Marmora Maro*. El la tieaj minejoj devenis ĉefe marmoro.